Galerio de Zamenhofoj

*

Kolektita
de Edvardo Wiesenfeld L. K.

Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo

Galerio
de
Zamenhofoj.

★

Kolektita
de
Edvardo Wiesenfeld L. K.

HEROLDO DE ESPERANTO
(TEO JUNG)
Harstenhoekweg 223
Scheveningen (Nederlando)

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 231
FILIA Nr 14
w Białymstoku

929.5 (438) "18/19" = 922

Antaŭparolo.

La familio Zamenhof prezentas unu tiel firme kunligitan rondeton, ke ĉiuj ĝiaj membroj estas kvazaŭ la kompletigoj de l' ceteraj al tuto. La reciprokaj tial influoj ĉe l' familianoj estas tiom grandaj, ke por plene kompreni iun ajn el ili estas tre utile ekkoni la tutan familion.

Prava kaj sprita estis tial la ekpenso de „Heroldo de Esperanto" kolekti la plenan kompleton de tiuj, kiuj formas la nedisigeblan Zamenhofujon. Kun plej granda ĝojo mi konsentis preni je mi tiun tute ne facilan taskon, tamen grandan honoron, entrepreni la kolekton de l' materialo. Dank' al la sorto restis ankoraŭ sufiĉe multe da Zamenhofoi por havi, kie ricevi informojn. Estu do tie ĉi al mi permesite en la nomo de „Heroldo", de ĉiuj legantoj, kaj de mi esprimi plej koran dankon al la familio Zamenhof (precipe al s-o Felikso, D-o Leono, kiu bonvolis ankaŭ trarigardi la plej esencan parton de la manuskripto, kaj s-ino Hermelin, fratino de l' Majstro) pro ilia senmezura komplezemo kaj senlaca helpo en la kolekto de materialo.

La verko, kiun mi nun prezentas, ne estas granda, tamen valora pro sia aŭtentikeco (ĉar ĉio estas ĉerpita el la unuaj fontoj) kaj estas la unua kaj la sola dokumentaro en la mondo, kiu, kune kun la „Vivo de Zamenhof“ (Edmond Privat), „La lastaj tagoj de D-o Zamenhof“ (Jung kaj Oberrotman) povas formi plenan kompleton.

La verkon mi decidis nomi „*Galerio de Zamenhofoj*“, ĉar nur tia ŝajnis al mi plej konvena titolo, kiam mi mem korektante transiradis de unu portreto al alia.

Varsovio, 16. 12. 1924. *E. W.*

I.

Marko (fil' de Fabiano) kaj Rozalio Zamenhof.

(La gepatroj.)

La patro Marko Zamenhof formis kun sia edzino vere du ekstremajn kontrastojn. Li — seka, sensentimenta, pedanta striktulo, ŝi — mola, sentema, milda, serena pardonemulino. Tamen kune ili formis bonan kaj decan neston. En rilatoj kun la infanoj Marko estis pedagogo. Jen estas la sola vorto, per kiu oni povus lin karakterizi. Justeco, reguleco kaj akurateco estis la vidpunktoj, laŭ kiuj li juĝis la agojn de l' infanoj, kaj konsekvence de tiuj estis la rekompencoj. Tamen oni ne rajtus rifuzi al li bonkorecon. Li nur ĉion traktis pli mense ol kore.

Alie, tute alie prezentiĝas la patrino. Ne malpli prudenta kaj saĝa, ŝi en rilatoj kun la infanoj estis ankaŭ ne malpli justa, sed vidis ĉion tra prismo de patrina koro. Kaj la rilatoj de l' gepatroj kun la infanoj trovis ĝustan resonon en la koroj kaj mensoj de l' infanoj. Se oni povus difini ilian rilaton al la patro per la vorto estimo, respekto, al la patrino ili rilatis kun amo, kelkaj eĉ kun adoro. La patro estis la juĝ-instanco, en kiu la patrino estis la defendantino. Kiam la patro

pro la ago de iu el la infanoj ekflamis per kolero, la patrino ĉiam penadis bagateligi la „krimon". Se tion ŝi ne sukcesadis, ŝi penadis konsoladi la puniton. Kaj ĉiam, kiam infano eliradis punita el la kabineto de l' patro kun ploro, ĝi „hazarde" renkontadis survoje en dua ĉambro la patrinon, kiu scipovis sekigi la larmojn de l' „malfeliĉulo".

Plej kutima puno estis la forpreno de tagmanĝo. Ne estis necesa ia speciale grava malbonago por esti kondamnata al sentagmanĝado. Plej malgranda bagatelaĵo — ofte eĉ sufiĉis la fakto, ke la infano havis tro grandan apetiton aŭ petis pri peco da pano ĵus antaŭ tagmanĝo — kaj jam tiun tagon ĝi ne ricevis tagmanĝon En tiaj okazoj la infano, sidanta kun plenlarmaj okuloj en ia ĉambro, ekaŭdis subite paŝojn. La maljuna kuiristino Mario alportis kaŝe la tagmanĝon kaj asertadis, ke ŝi apenaŭ sukcesis lastafoje ĉe la patrino, ke tiu sendu la tagmanĝon. Kompreneble, ĉio ĉi okazadis dum la postmanĝa dormeto de l' patro.

Marko Zamenhof edziĝis en 1858 kun la dekokjara fraŭlino Rozalio, filin' de Ŝolemo Sofer.

En 1859 (la 15. 12.) naskiĝis ĉe ili la venonta mondfamo, Ludoviko (hebree: Lazaro) Zamenhof.

La sekvantaj infanoj iris laŭ jena ordo: Saro (filino), Fani (filino), Aŭgustino (filino), Felikso (aŭ: Fabiano), Henriko, Leono, Aleksandro, kaj Ida (filino).

Saro vivis nelonge, kaj restis nur 8 infanoj: 3 filinoj kaj 5 filoj, el kiuj 4 fariĝis poste kuracistoj kaj unu apotekisto (Felikso).

Dum vivis la patrino, ŝi ĉiam estis la pacigantino inter la infanoj kaj patro. Tiel ŝi fariĝis por ili vera anĝel'-gardanto kaj lasis ĉe ili post si la impreson kaj opinion de plej alta noblulino. Ĝis nun ne nur la infanoj, sed ankaŭ la nepoj kaj aliaj proksimuloj (edukitoj de l' edukejo, gvidita de Marko Zamenhof) ne parolas pri ŝi alie ol kun plej granda pietismo.

Marko Zamenhof tutan sian vivon estis edukisto. Ĉu kiel instruisto, ĉu kiel lernejestro, ĉu kiel pension-havanto, li ĉiam estis plene fordonita al sia metio. Kaj samspeca estis lia rilato al siaj propraj infanoj.

Alia tamen fariĝis la patro post la morto de Rozalio en 1892. Ekvekiĝis en li la sento. Li konsciiĝis, ke jam mankos nun la varma radio, kiu dolĉigadis la amarajn momentojn al liaj infanoj. Kaj ekde nun ni vidas lin kiel zorgantan kaj sentoplenan patron. Per tio eble estas klarigebla la fakto, ke ĉiu el la infanoj, forminte sian propran neston, ne forflugis, ne forŝiriĝis de l' familia tuto. Tiu faktoro tiel kunligis ĉiujn infanojn, ke ili ĝis nun gardas la kutimon kunvenadi ĉiusabate. Kaj nur ekstreme grava kaŭzo detenus iun el la Zamenhofoj de tiu kunveno. Ĉiuj ĝis nun restantaj anoj de l' familio vivas en plej granda kaj plej intima amikeco.

Marko mortis en 1907, atinginte 70-jaran aĝon, multegajn honorojn, atestojn, diplomojn kaj ordenojn, kun la titolo: ŝtatkonsilisto. Sur la hebrea tombejo (sufiĉe proksima de la loko, kie nun ripozas lia filo Ludoviko) oni lin enterigis kun grandaj honoroj. Ĉiuj liaj lernintoj akompanis lin

(inter kiuj troviĝis ankaŭ la aŭtoro de ĉi-artikolo) kaj la direktoro de l' Varsovia Reala Lernejo, grafo Argutinskij-Dolgorukov, surŝutis la unuan plenmanon da sablo.

* * *

— El la ĉefaj verkoj, kiujn Marko Zamenhof postlasis, estas konataj: 1. Biblio mallongigita, 2. Lernolibro de geografio, kaj 3. Frazeologio (Rusa, Franca kaj Germana, poste ankaŭ en Esperanto-traduko de l' filo Ludoviko).

II.

D-o Ludoviko Zamenhof

aŭtoro de Esperanto (1859—1917).

Ĉu post la plena elĉerpo de l' materialo per la fama Edmond Privat en sia „Vivo de Zamenhof“ povas ankoraŭ resti io por diri? En ĉiu okazo treege nemulte.

Kiu volas ekscii pli detale, devas nepre studi la verkon de Privat . . .

Fanatika kaj tro ekzaltema ŝajnas la historiisto, kiam li ne povas skribi pri sia Majstro ion alian ol laŭdindaĵojn. Ne kredindaj oni trovas la priskribojn, neobjektiva — la karakterizon kaj elpensitaj — la faktojn. Kion tamen fari, se, laŭ nekomprenebla volo de l' sorto, D-o Ludoviko Zamenhof estis kaj restis ĉiam en la memoro de **ĉiuj** liaj proksimuloj plej nobla, plej alta kaj super ĉio imagebla plej bona?

Ludoviko ĝuis esceptan traktadon de l' gepatroj. Sed kvankam infano li tiun privilegion ne malbonuzis. Kontraŭe li utiligis la situacion por plej noblaj celoj. Kaj estante laŭaĝe ankoraŭ knabo, laŭmense kaj kore li estis jam la protektanto-edukanto de siaj gefratoj, kaj nur dank' al siaj privilegioj li povis ilin protektadi; precipe antaŭ la patro, kiam iu el ili ion ekpetolis.

El ĉiuj infanoj Ludoviko ĝuis la plej grandan privilegion ĉe l' patro, kiu al tiu filo rilatadis kun ioma esceptemo. Ankaŭ la patrino ekstreme kaj senlime amegis tiun infanon, kiu estis por ŝi kvazaŭ okulpupilo. La ceteraj infanoj ne nur ne estis ĵaluzaj, sed kontraŭe, tre ĝojis pro tio. Ĉar Ludoviko — ilia plej aĝa frato — estis por ili tio, kio mankis al ili en la patro. Bonkora kaj sentema, li scipovis ĉiam evidentigi indulgemon al la petoloj de siaj pli junaj gefratoj. Kaj, ĝuante specialan favoron de l' patro, li tre ofte pledadis por la fratoj. Kaj vere la gefratoj sentis pro tio al li grandegan dankemon. Unu el la fratoj en sia taglibro notis la jenan fakton:

Kiam li (la frato), lernanto de l' unua klaso de l' gimnazio, pro forgesemo enkuris foje en la instruisto-ĉambron kun ĉapo sur la kapo, la inspektoro forprenis de li la ĉapon. Ploris tiam la infano kaj . . . kuris serĉi helpon al Ludoviko. Ludoviko tuj iris kun li al la inspektoro kaj petis pri pardono al lia juna frateto, kiu, estante ankoraŭ infano, forgesis sin momenton. La inspektoro, tuŝita, redonis al la knabo la ĉapon kaj diris: Danku al via frato Ludoviko kaj penu esti ankaŭ tia, kiel li, ĉar tio estas la fiero de mia lernejo!

Foje vespere, kiam la infanoj pretiĝis por la lito kaj la patro laŭkutime preparadis ĉiujn siajn necesajn kajerojn kaj librojn por la morgaŭa tago, ĉiuj ĉeestantoj estis konsternitaj pro laŭta kaj brua sonoro ĉe l' pordo. Kun streĉo oni malfermas la pordon: Ludoviko kun la gekuzoj ensaltis vive kaj vigligis la tutan atmosferon per ridoj, kantoj kaj dancoj. Kaj la patro, tiu strikta

akuratulo, ne kontraŭdiris eĉ unu vorton, malgraŭ tio, ke oni devis esti leviĝontaj frumatene. Je tiaj „frivoloj" povis al si permesi nur Ludoviko, kaj de tio profitadis la ceteraj infanoj.

Ludoviko mem estis ĉiam vivoplena kaj gaja knabo. Dancado, kantado, ekskursoj estis liaj plej amataj plezuroj. Kaj ofte li organizadis piedirajn promenojn al Wilanów kaj aliaj ĉirkaŭaĵoj de Varsovio. Ĉiam kun siaj gefratoj kaj kuzoj.

Ĉio ĉi efikis, ke Ludoviko estis amata ĝis plej alta grado, preskaŭ adorata de ĉiuj siaj familianoj. Post la morto de l' patro Ludoviko okupis tiun ĉeflokon en la familio, kiun ĝis nun prezentadis Marko Zamenhof. Li fariĝas la akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas la menso, koro kaj zorgoj de l' tuta familio. En la postaj jaroj, kiam lia sano jam ne estis en brila stato, la „familiaj kunvenoj" ĉiusabataj okazadis ĉe li, kaj la tuta familio venadis, ĉiu kun siaj aferoj, zorgoj aŭ demandoj por konsultadi la plej saĝan kaj la plej noblan membron de l' familio. Nek unu paŝo, eĉ plej malgrava, estis decidata en la tuta familio, sen la konsulto ĉe Ludoviko. En kiun lernejon doni la infanon, kien veturi somerripozi, kiun gazeton aboni — ĉion ĉiam decidadis Ludoviko.

Kaj ne vane ĝuis Ludoviko tian fidon. Tro saĝa li estis, tro sindona kaj tro nobla, por ke oni povu eĉ unu minuton supozi, ke lia konsilo ne estas atentinda. Jam de l' unuaj jaroj li evidentigis neordinaran laboron en la cerbo. Kiam knabe li ricevis demandon de l' patro: „Ĉu vi volas iri gimnazion?", li post momenta medito respondis: „Ĉu mi iros ĉien, kien mi volos?"

Kiom disvolviĝinta estis lia intelekto, povas pruvi la fakto, ke la patro, tiu seka instruitulo (la parencoj pardonu al mi la esprimon!) havis plej grandan respekton por la inteligenteco de Ludoviko.

Kiam Ludoviko iomete pliaĝiĝis, li helpadis multege al la patro en la „Proverbaro". Sciante kiom malmulte profitodonaj estas la esperantaj verkoj kaj ne volante ĉagrenigi la patron, li rezignis je la esperanta eldono de l' Proverbaro, malgraŭ tio, ke li mem ĝin jam estis plene tradukinta. Tamen sekrete li traktis kun berlina firmao (ĉu ne Möller & Borel?) pri eldono de l' esperanta traduko. Kaj kiel grandega estis lia feliĉo, kiam li povis foje veni al la patro kun la ĝojiga komuniko, ke oni el Berlino sendis honorarion por la Proverbaro kaj ke baldaŭ ĝi aperos en la esperanta traduko. Tie ĉi mi volas kun rezervo noti, ke estas sekretrakontoj, ke . . la monon Ludoviko pagis al la patro el sia propra poŝo.*)

La bonkoreco de Ludoviko estis eĉ iufoje trapasanta la ekstremlimojn. Grandega naturamanto li sentis sin feliĉa, kiam li havis la eblon flegi ian ajn kreskaĵon. Kun plej granda kontenteco rakontas ankoraŭ ĝis nun liaj gefratoj pri la ĝardeneto, kiun ili, sub la gvido de Ludoviko, flegadis, kiam ili loĝis en la strato Nowolipie 28 en Varsovio. Neniam li (same ili) deŝiris floreton. Kaj al neniu lasis tion fari. Samtipaj estis Felikso kaj Aleksandro.

*) Kiel mi poste eksciis, tio estas fakto aŭtentika.

Ludoviko forte kredis je ĉio, kion ordonis al li ia interna voĉo. Ankaŭ en sian Homaranismon li senhezite kaj firme kredis.

Kiam li estis junulo-studento, lin logadis la ideo pri sionismo. Li kredis, ke ne povas esti bone al la hebreoj, ĝis kiam ili havos propran teron, kolonion aŭ ion similan. Kaj certan tempon li multe studis kaj okupiĝis pri la kolonizo de tero en Sudrusujo (Ukrainujo) per hebreoj. Poste li revis pri Palestino. Multajn, multegajn poeziojn kaj propagandartikolojn li skribadis tiutemajn. Li eĉ perlaboradis per tio dum siaj studentaj jaroj sian vivon. Dum la unua sionista kongreso en Varsovio li havis brilan paroladon, kiu famigis lin en la koncernaj sferoj.

Kun la fluo de l' tempo liaj zorgoj pri la sorto de l' hebreoj plilarĝiĝadis, kaj iom post iom ili ŝanĝiĝas je revoj pri la feliĉigo de l' tuta homaro.

En la sesa klaso estinte Ludoviko komencas prilabori la universalan lingvon. Kio poste okazadis — ĉiuj ni bone scias.

Intertempe Ludoviko ekkonis ĉe gesinjoroj Lewite ilian parencinon el Kovno, f-linon Klara Silbernik, kiu gastis en Varsovio. La gejunuloj ekplaĉis al si, kaj en 1887 ili edziĝas. La juna edzino baldaŭ entuziasmiĝas je l' ideo, kaj post la interkonsento kun sia patro s-o Aleksandro Silbernik fordonas tutan sian doton por la presigo de l' „Unua libro". En la strato Muranowska loĝis la juna paro, kiam alvenis de l' presisto (s-o Kelter) la unua broŝuro. Ĝojo, feliĉo, entuziasmo. La bopatro ne nur permesis, sed eĉ sub-

venciadis multege el sia poŝo por la pluaj eldonoj. En tre mallonga tempo s-o Silbernik eklernis la lingvon, kaj baldaŭ li estis unu el la unuaj parolintaj Esperanton kun nia Majstro.

Rapide iris la laboro. Ludoviko dissendas la broŝuron al diversaj instruituloj. S-ino Klara skribas la adresojn, la frato Felikso (knabo ankoraŭ, tamen rapidege ellerninta la lingvon) forportadis poŝtejon kaj . . . tiel komenciĝas la historio de Esperanto.

Menciinda estas ankoraŭ unu inklino de Ludoviko dum liaj junaj jaroj. Li estis unu el la unuaj, kiuj elpensis la skribmaŝinon. Ĉe la familio ĝis nun troviĝas la priskribo, plano kaj modelo de l' sistemo, de li elpensita. Ankaŭ tie ĉi helpis lin la frateto Felikso, kiu preparis la klavaron. La sistemon li ĉiam plibonigadis, ĝis . . . hazarde ekvidinte pli perfektan sistemon li rezignis je ĉiu plua laboro tiudirekta.

Por fini la karakterizon de Ludoviko ni devas forte substreki lian neelĉerpeblan indulgemon. Ekde siaj junaj jaroj (al siaj gefratoj) ĝis siaj lastaj tagoj (al konatoj, amikoj kaj samideanoj) li ne nur neniam malbonpensis pri iu (eĉ Beaufront k. a.), sed, kontraŭe, penis pruvi, ke ili agas en lojala intenco. Mi memoras, kiel la Majstro (en siaj lastaj jam jaroj) penadis konvinki min, ke de Saussure ĉiujn siajn reformojn eksperimentas bonvole, intence, por finfine publike veni al la konkludo, ke el ĉiuj liaj eksperimentoj la plej bona estas ĝuste nur Esperanto.

Mi permesas al mi fini per konciza

Kronologio de l' vivo de nia Majstro.

1859 la 15. 12. naskiĝis Ludoviko Zamenhof.
1869 Ludoviko eniras la Bielostokan Reallernejon.
1873 „ translokiĝas Varsovion.
1874 „ eniras la IV-an klason de l' II-a Varsovia [filologia gimnazio (Nowolipki 9).
1878 „ festas en sia ĉambreto (Nowolipie 28) la *[tagon de vivigo de la universala lingvo.*
1879 „ finas la gimnazion kaj veturas Moskvon por [studi en la tiea universitato.
1885 „ finas la universitaton.
1886 „ veturas Vienon.
1887 „ edziĝas kaj loĝiĝas ĉe str. Przejazd 9.
1887 la 2. 6. eliras la *Unua libro.*
1889 aperas la unua numero de *„Esperantisto"* sub la kun- [laborado de D-o Esperanto.
1890 Ludoviko revenas Varsovion el Ĥerson.
1893 „ translokiĝas Grodnon.
1897 „ revenas Varsovion kaj loĝiĝas ĉe Dzika 9.
1905 „ aranĝas la I-an Univ. Kongreson de Esper- [anto en Boulogne s. mer.
1912 „ dum la VIII-a Jubilea Kongreso en Krakovo [demetas de si la taskon de l' gvidanto de Esp.
1917 la 14. 4. Ludoviko mortis.
1917 la 16. 4. „ estas enterigita.
1917 la 28.—30. 4. en la Varsovia Kinematografo „Urania" [(Filharmonio) oni montradis la funebran procesion.

Nun ankoraŭ nova rubrikaĵo:

1924 la 8. 12. mortis la kontinuantino de Majstro s-ino Klara [Zamenhof.

III.

S-ino Klara Zamenhof.

(1863—1924.)

Miopa estas tiu, kiu en s-ino Klara Zamenhof ne vidas pli ol la edzinon de D-o Ludoviko Zamenhof. Eraras, kiu tiel opinias.

Se ŝi dum la vivo de l' edzo vere ne havis la eblon aŭ bezonon distingiĝadi, do jam certe post lia morto ŝi okupas la unuan, la plej honoran lokon inter la esperantistaro. Tion plej elokvente pruvas la flamaj ovacioj dum niaj lastaj kongresoj.

S-ino Klara Zamenhof naskiĝis en 1863 en Kovno (Litovujo) ĉe gepatroj Aleksandro Silbernik kaj Hadasa Beloch. Pri ŝiaj infanjaroj ni ne havas informojn. Post la fino de l' tiea gimnazio (en 1881) f-lino Silbernik ofte jam vizitadas siajn diversajn parencojn loĝantajn en diversaj urboj de l' tiama Rusujo. Inter alie ŝi gastis ankaŭ en Varsovio, ĉe gesinjoroj Lewite, kien venadis ankaŭ la familio Zamenhof. Post nelonga tempo f-lino Klara Silbernik ŝanĝas jam sian familinomon je Zamenhof kaj kune kun sia edzo D-o Ludoviko ekloĝas en Varsovio (Przejazd 9). Jam de l' unuaj tempoj de ilia edziĝo komenciĝas ŝia kunlaboro en la grandioza verko de l' edzo. Post la ricevo (el la presejo) de l' unua broŝuro, Zamenhof tuj komenças ĝian dissendadon al diversaj instruituloj,

institucioj, redakcioj ktp. La edzino gluas la banderolojn, skribas la adresojn kaj ĝenerale plenumas ĉiujn liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn. F-lino Klara Silbernik estis riĉa filino, kaj ŝia patro, kiu edzinigis siajn filinojn kun riĉuloj, nunfoje fordonis sian infanon al malriĉa kuracisto. Por tiutempaj kondiĉoj — tio estis ago sufiĉe kuraĝa kaj idealisma. Same de l' patro kiel de l' filino. Kaj se ni aldonos, ke ankoraŭ antaŭ la edziĝo Zamenhof ricevis la doton kaj tuj ĝin elspezis por la publikigo de l' unua broŝuro — ideo, kiun oni povus tiutempe facile konfuzi kun frenezeco —, tiam tiu ago fariĝas vere notinda kaj eksterordinara.

Feliĉa kaj riĉa en sia patra hejmo f-lino Klara ne estis tia post sia edziniĝo. Vere ŝi amegis la edzon. Baldaŭ naskiĝis infanoj, kaj la ĝojo estis plena. Sed . . . la felicxo estis detruata: Ludoviko Zamenhof ne ĝuis plenan sanon. Kaj s-ino Klara fariĝas plej sindona kaj plej fidela flegistino, plej pacienca fratino de sia edzo. Kaj nur dank' al tiu ŝia nepriskribebla zorgemo la edzo povis daŭrigadi sian laboron. Kaj tiel pasadis ŝiaj jaroj. Zamenhof ĉiam pli kaj pli malfortiĝadis, kaj s-ino Klara nek unu fojon, neniam ajn, forgesis pri sia edzo. Ĉie, ĉiam kaj ĉiel ŝi plenigis siajn vivzorgojn nur per penso pri li. Kaj tio ŝin ne lacigis. Nek tedis. Kontraŭe per sia ĉiama nedisiĝebla rideto, ŝi ĉiam admonadis al li ĉu pri manĝo, ĉu pri kuracilo, ĉu pri ripozo.

Ne dolĉe pasadis la tempo. Tamen s-ino Klara estis ĉiam kontenta. Nenia penso pri revoltiĝo. Nenia volo al protesto. La serena, bonkora mildeco neniam ŝin forlasis. Neniu ŝin vidis iam ajn

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego
Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

sen rideto sur buŝo. Kaj nur dank' al tiu ŝia ĉiama bonhumoro, al tiu ŝia plena kaj senkondiĉa sindono nia Majstro povis dum sia vivo partopreni ĉiujn kongresojn. Malgraŭ tio, ke la malsano lin longjarojn turmentadis.

En neriĉa stato, soleca, disigita de ĉiuj siaj konatoj kaj amikoj eksterlandaj foriris Eternujon nia Majstro. Ŝia edzo, feliĉo kaj fiero. Grandega kaj tro kruela estis la sortbato . . .

Kaj ekde 1917 s-ino Klara Zamenhof restis en la esperanta movado, kvazaŭ lia kontinuantino. Ŝia interesiĝo pri la movado fariĝas pli granda kaj ŝi fariĝas aktiva samideanino. Estante malsana ŝi fine ne povis respondadi la amasiĝintan korespondaĵaron. Tamen ŝi ne forgesis pri sia tutmonda samideanaro. Por la tuta mondo ŝi estis kvazaŭ la bildo post nia Majstro, al kiu estis turnitaj ĉies okuloj, pri ĉiu nova plano aŭ intenco oni informas kaj konsultas ŝin. Ŝi mem plene interesiĝas pri ĉio, kio nur koncernas Esperanton, kaj plenmerita estas ŝia titolo: Patrino de Esperanto. En la lokaj cirkonstancoj, en Varsovio, ŝi havis por si pli grandan kampon por agi. Kaj efektive ĝis siaj lastaj tagoj ŝi prenas aktivan parton en la varsovia vivo esperantista. Dank' al ŝia agema kunhelpo naskiĝis en Varsovio la societo „Konkordo", kaj en la ĉambro, kie ĝis sia lasta spiro troviĝis nia Majstro (ĉe Królewska 41) okazis la inaŭguracia kunveno de tiu societo, kiu iom post iom, ĉiam pli kaj pli vastiĝante, fariĝas movado tutmonda (Interna Ideo). Dank' al ŝia afabla kunhelpo „Konkordo" ricevis konstantan loĝejon ĉe str. Dzika 9 kaj nur ekde tiu tempo povis konkrete ekzisti. Sed ne nur en

unu societo kuŝis ŝiaj meritoj. Kiel en ĉiu alia urbo, ankaŭ en Varsovio la esperantistaj societoj vivis dise kaj ofte malpace inter si. Nur en la demandoj koncernantaj ŝin — ĉiuj restis unuanimaj. Kaj nur ŝi scipovis alte teni la standardon de pacigo inter la societoj. Neniam evidentigante ian ajn partiecon, ŝi per sia saĝa kaj justa sinteno sciis gajni ĉies konfidon kaj tiamaniere fariĝis por ni, ĉiuj varsovianoj, eksterdiskuta.

La lastajn jarojn ŝi iomete malpacienciĝadis pro la malrapida efektiviĝo de la Monumento por ŝia edzo. Sep jaroj pasis. Sur la tombejo multegajn aliajn pli novajn tombojn jam delonge kovris tomboŝtonoj. Nur unu sola inter ĉiuj staris kvazaŭ dezerta kaj de ĉiuj forgesita — la tombo de ŝia edzo.

Ŝi tiel sopiris vidi la monumenton!

Ne favora estis por ŝi la sorto.

La monumenton ŝi ne sukcesis ĝisvivi.

* * *

Reveturinte el eksterlando post la XVI-a en Vieno (kiu ŝin vidis tie, certe rimarkis, kiel ŝi senlace partoprenis ĉiujn lacigajn okazantaĵojn, tenante per la dekstra mano ĉiam la ŝin tre dolorantan hepaton), ŝi restis kvar semajnojn en ĉeĥoslovaka Trentino, kie ŝi havis sufiĉe elĉerpan kuracadon kaj revenis hejmen komplete malsana. Dum du monatoj ŝi kuŝis en la lito. (Mi ŝin lastfoje vidis en oktobro jam en la lito; ŝi tre malbone aspektis; tamen la nedisiĝebla rideto ne forlasis ŝin.) Poste oni volis fari al ŝi operacion,

sed post malfermo de l' interno oni trovis, ke jam nenio estas farebla. La familianoj estis pri ĉio informitaj kaj antaŭvidis ŝian baldaŭan morton.

La 6-an de decembro 1924 ŝi fermis por ĉiam la okulojn kaj foriris tien, el kie oni ne revenas plu.

Modesta estis ŝia vivo. Modesta estis la morto.

IV.

D-o Adamo Zamenhof.

Post la morto de nia Majstro, lia domo restis ankoraŭ la nordpoluso, kiu altiradis la magnet-montrilojn de l' tutmonda samideanaro. Ĉiu eklernis alkutimi al tio, ke ne vivas plu nia Majstro, tamen ĉiu senrimarke alkutimadis plusati la adreson: Królewska 41. Ĉiu kongreso, ĉiu ĵurnalo, ĉiu aro da esperantistoj sentis sia plej necesa devo komenci sian ekziston per saluto al s-ino Zamenhof. La edzino de nia Majstro fariĝis post lia morto, kvazaŭ per ia muta interkonsento, la kontinuantino de l' grandega Ideo. La respekto al ŝi kreskis de tago al tago . . .

Sed nun, post kiam la morto tratranĉis ŝian vivon kaj lasis per tio grandegan malplenaĵon en niaj koroj kaj mensoj, nun kien turniĝos niaj okuloj? En kiun flankon direktu sin niaj magnet-montriloj?

Ĉe la strato Królewska 41 ne restis heredulo de n i a granda Patro. Ni esperu tamen, kaj plej certe la tuta esperantistaro volas esperi, ke la altajn gepatrojn sekvu kaj anstataŭu inda ido.

Mi memoras, ke Marko Zamenhof ekvidinte, ke post la morto de lia edzino mankas al la infanoj patrina koro, ŝanĝiĝis kaj fariĝis por la infanoj tio, kion ili kutimis havi de l' patrino . . . Ĉu

nepo de tiu avo ne volus imiti tiun benindan agon kaj al la orfiĝinta esperantistaro almenaŭ parte anstataŭi la Patron?

* * *

La 11-an de junio 1888 D-o Ludoviko Zamenhof, loĝinta tiam ĉe strato Przejazd 9, fariĝis feliĉa patro de filo, nomita A d a m o.

La juna infano ricevis la unuan edukon hejme, poste en 1897 fariĝis lernanto de l' II-a Varsovia filologia gimnazio. En 1905 Adamo finis la gimnazion en Kowno kaj, por studi la universitaton, li forveturas en 1906 Svisujon (Lozano); li finas ĝin en 1911, kiel kuracisto-okulisto. Ĝis 1914 li praktikis en la tiea universitata okul-kliniko kiel asistanto de Prof. Eperon, post kio li revenas hejmen, kaj post sukcesplena registarekzameno en Kijevo li ricevas la rajton praktiki la kuracarton en tuta Rusujo.

Komence li laboris kiel asistanto de sia patro, sed baldaŭ D-o Ludoviko Zamenhof pro malsano devas interrompi sian praktikon. Tiam la filo plene kaj inde lin anstataŭas (ĉu ne estas nun la tempo por same agi?) kaj ekde tiam D-o Adamo Zamenhof praktikas en la ambulatorio ĉe str. Dzika 9 ĝis nun. Post la morto de sia patro, D-o Adamo Zamenhof fariĝis plena mastro de tiu ambulatorio kiel ankaŭ de l' privata kabineto ĉe strato Królewska 41. La nomo restinta post la patro multe utilis, kaj la pacientaro senrimarke transiradis al li. Tiel do lia materia stato ne estis malbona kaj li perlaboris sufiĉe bone por vivteni sian patrinon kaj fratinon.

En 1919 D-o Adamo Zamenhof kiel kuracisto estis mobilizata kaj tiel militservis (kapitano) ĝis 1922, post kiam li ree prenis sin al sia profesio, kaj ĝis nun li kuracas siajn okulmalsanulojn ĉe Królewska 41 kaj Dzika 9.

En 1923 Adamo edziĝas kun fraŭlino D-o W a n d a F r e n k e l (filino de D-o Maksimiliano kaj Sofio, naskita Celniker), kiun li konis ekde la infanaj jaroj.

Lia edzino s-ino Wanda naskiĝis en 1893 en Varsovio. Post la fino de gimnazio ŝi ankaŭ veturas Lozanon studi. Poste ŝi transveturas Moskvon. La milito multe interrompis. Fine en jaro 1921 ŝi finis la varsovian universitaton ankaŭ kiel okulkuracistino. En 1923 ŝi fariĝas s-ino Zamenhof kaj ekde tiu tempo dividas kun sia edzo krom la ĝojoj, zorgoj ktp. ankaŭ la profesion kaj scienclaborojn. Nun ŝi laboras ankaŭ en la malsanul-kaso de Varsovio. Esperanton ŝi . . . promesas koni.*)

D-o Adamo Zamenhof plene fordonis sin al sia profesio kaj skribis multajn verkojn pri la okula kuracado. La edzino — ankaŭ okulistino — en ĉio helpas lin (kiel la historio ripetiĝas!). El liaj gravaj verkoj estas konataj: „Pri astigmatismo“ (disertacio), „La patologia anatomio de l' okulo“. Krom tio multaj estas liaj scienc-artikoloj publikigitaj en la ĵurnalo „Klinika oczna“ (La okula kliniko), inter kiuj ĉefan lokon okupas „Cyclitis desquamativa“ kaj aliaj („Granulomata conjunctivae“).

*) Kiel mi poste eksciis, ŝi jam scias paroli.

En siaj pli junaj jaroj Adamo tre ŝatis la muzikon. Ludante bone la violonĉelon, li ofte partoprenadis kvartetojn, aranĝatajn de l' Varsovia Muzika Klubo.

Esperanton li posedas flue kaj perfekte, sed ne okupiĝas pri la movado. Jam en la knabaj jaroj li eklernis Esperanton, estis siatempe tre fervora samideano kaj tradukadis diversajn poeziaĵojn el Puŝkin. Estante gimnaziano, li redaktis la „Adresaron". Kiam li forveturis, neniu povis lin anstataŭi, kaj tiam la Adresaro ĉesis eliradi. Ankaŭ la unuan korektaĵon de l' „Fundamenta Krestomatio" li trarigardis. Krom tio Adamo helpadis multe al sia patro en la korespondado, ekspedado de libroj ktp.

Fine maljuste estus pasi per silento preter lia merito al la varsovia societo „Konkordo". Nur dank' al li Konkordo profitas s e n p a g e de la loĝejo (kaj havas sian konstantan sidejon!) ĉe Dzika 9, kie li estas la mastro de l' ambulatorio.

Sian nunan malaktivecon en Esperanto li senkulpigas per manko de tempo.

Ĉu nin — esperantistaron — tia senkulpiĝo kontentigas?

V.

D-o Sofio Zamenhof.

Vigla, sprita kaj vivoplena; tipo elsaltinta kvazaŭ ĉampankorko el la trankvila, kvieta kaj solida flegmularo Zamenhofa, estas f-lino Sofio. Io tute akre ŝin distingas de la aliaj komuntrajtaj komunkvalitaj familianoj. Se ĉiuj Zamenhofoj posedas kiel ecojn karakterizajn la sinĝenon kaj silentemon, ŝi kontraŭe estas tre kuraĝa, rapide konatiĝas kaj amas babili multe (eble eĉ tro). Ĉiam gaja, ŝi kun ĉiu baldaŭ amikiĝas, rapide ekkonas la internan valoron de homo kaj forĵetas ĉiujn konvenecajn formojn fariĝante tiamaniere ofte malglata, kruda, sed . . . treege simpatia. Tipo, kiu ĉiujn bonajn ecojn, kiel noblanimecon, gastemon, bonkorecon, honestecon kaj multajn nekalkuleblajn kvalitojn heredis de l' Zamenhofoj, sed la temperamenton certe — ŝtelis ĉe iu el la sudo.

Sofio naskiĝis en la jaro . . . Ĉu decas skribi pri aĝo de fraŭlino?

Eble ne, sed pri ŝi — jes, oni povas skribi . . .

Oni povas, sed mi ne volas . . . Kion mi volas substreki, estas tio, ke ĉio imagebla per la vorto juneco: vivsopiro, vigleco, ĝojopleno, koleremo, pasio, malkvietemo, insultemo, rapidemo, ĉio troviĝas en ŝi. Kaj mi estas certa, ke post tralego

de tiu ĉi skribaĵo ŝi elversos sur mian kapon tian grandan sitelon da insultoj, ke certe en dek vortaroj kune ne troviĝas tiom da ili . . .

Sed al la afero.

Kiel malgranda knabino Sofio estis jam tre kapabla. En 1905 ŝi finis la III-an virinan gimnazion, kiu tiutempe ne egalis laŭ valideco al la viraj gimnazioj. Tial, volante studi la universitaton, ŝi devis ekzameniĝi ĉe vira gimnazio, kion ŝi baldaŭ sukcesplene faris. Poste ŝi veturas — same kiel ŝia frato — Lozanon, kie ŝi finas la universitaton en 1913. Reveninte hejmen kiel kuracistino (internaj kaj infanaj malsanoj), ŝi baldaŭ en 1914 faris la registar-ekzamenon en la petersburga universitato kaj ricevis la rajton praktiki la kuracarton en la tuta Rusujo.

La milito separigis ŝin de l' gepatra hejmo. La gepatroj restis en Varsovio, kiun okupaciis la germanoj, kaj D-o Sofio restis en Rusujo ĝis post la milito. La patron ŝi plu ne vidis.

Ekde 1915 ŝi loĝis en Rusujo (en Ĥarkova gubernio) kaj praktikis kiel vilaĝa kuracistino. En 1920 ŝi estis mobilizata kaj ĝis 1922 servis kiel regimenta kuracistino. Intertempe ŝi trifoje malsanis je tifo, kaj tio — kune kun la malbonaj vivkondiĉoj — treege ŝin elĉerpis.

Varsovion ŝi revenis en 1922 laca, senforta, jam ne renkontante la patron. Dank' al la plej sindona flegado de l' patrino, ŝi baldaŭ refariĝis bonfarta, komencis praktiki kaj ĝis nun laboras en sia profesio en hospitalo. La pasintaj malbonsortaj tagoj ne lasis postsignojn, kaj nun, kiel menciite, ŝi estas la konglomeraĵo de ĉio viveca

kaj loĝas kune kun sia frato kaj fratino ĉe Królewska 41.

Esperanton ŝi posedas flue. Pri la movado ŝi okupiĝas ĝis plej malgranda detalaĵo. Informite pri ĉio ne nur en Varsovio, sed tra la tuta mondo okazanta, ŝi venadas al ĉiuj kunvenoj, sed — aktive ne partoprenas la esperantistan vivon. Al sia patro Sofio multe helpis per aranĝado de l' poŝtaj aferoj (post la forveturo de Adamo) kaj per aranĝo kaj gvidado de l' belega kaj riĉa biblioteko. La bibliotekon, kiu konsistas el kelkcent volumoj, ŝi gvidas ĝis nun.

En la lastaj monatoj, kiam la patrino kuŝis malsana, ŝi krom per flegado (kiel kuracistino) ankaŭ helpis al la patrino per aranĝo kaj anstataŭado en ĉiuj korespondaferoj.

Jen tia estas la portreto de l' plej viveca kaj plej simpatia el la Zamenhofoj.

VI.

F-lino Lili Zamenhof.

En la jaro 1913 s-ino Klara Zamenhof skribis al sia filino Sofio, kiu tiam kune kun Adamo troviĝis en Lozano, leteron, en kiu ŝi esprimas sian maloportunan situacion pro la filino Lili. Esperanton ŝi ankoraŭ ne posedis, sekve kunveturigi ŝin al laKongreso (Bernon) oni ne povas, lasi ŝin hejme sola — la patrino ne volis. Kion do fari?

Ankaŭ f-lino Sofio ĉagrenis pro tio kune kun sia frato, kaj ambaŭ decidis konsili al la patrino lasi la infanon ĉe iu el la parencoj.

Sed ne tiel facile oni disigas patrinon de infano. Lasi Lilion en Varsovio s-ino Klara Zamenhof ne volis.

En Berno la gepatroj renkontiĝis kun la infanoj, kiuj konsterniĝis: la naŭjara bubino parolis flue Esperanton. La patrino trovis pli bonan elirpunkton el la situacio. Ŝi instigis la infanon lerni la lingvon kaj eĉ minacis, ke sen scio de la lingvo la filino ne veturos al la Kongreso. La dolĉ-rida vizaĝo de s-ino Zamenhof devis ŝajnigi minacesprimon (mi tion ne imagas), kaj Lili dum ses semainoj eksposedis Esperanton.

Tie ĉi mi volus mencii koncernan anekdoton, cirkulantan ĝis nun en la familio Zamenhof.

Ĝi estis en 1909. D-o Ludoviko Zamenhof festis sian jubilean, kvindekan naskiĝtagon. Inter la multaj gastoj troviĝis niaj eminentaj bardoj esperantistaj: Grabowski, Belmont, Kabe k. a. S-ino Zamenhof prezentas al ĉiuj sian plej junan „konsolon", la kvinjaran Lilieton. Tiam niaj samideanoj komencis glori kaj honori nian Majstron kaj la tutan familion. Ĉion — kompreneble — en Esperanto . . . Subite la malgrandulino leviĝas ofendita kaj eliras el la salono kun la vortoj: „Kiel ili babilaĉas? Mi ja nenion komprenas . . ."

F-lino Lili estas la plej juna Zamenhofido de l' familio de la Majstro. Naskita en 1904, ŝi evidentigis grandan kapablecon ekde frua juneco kaj frue komencis lerni. En 1913 ŝi jam estis gimnazianino. La terura milito, la okupacio de Varsovio, la morto de l' patro — ĉio ĉi estis por ŝi kondiĉoj ne tro favoraj, tamen tio ne malhelpis al ŝi normale fini la lernejon en 1921. En la sama jaro ŝi eniras la varsovian universitaton je jurista fakultato, kiun ŝi studas ĝis nun. En jaro 1925 ŝi finos la universitaton kaj estos la unua juristo en la tuta Zamenhofa familio.

Laŭ karaktero kaj temperamento tio estas tipa Zamenhofo, nur iomete kruda, kio klariĝas per junaĝeco. Ĉiuj ecoj, evidentiĝantaj en la Zamenhofoj kaj kiuj ilin karakterizas, troviĝas en ŝi.

Ekde la infaneco ŝi havis inklinon al pentrado kaj iom okupiĝas pri tio, ankoraŭ ĝis nun, montrante nemalŝatindan talenton. Ankaŭ ŝi okupiĝas pri aplikita arto, kie ŝi meritas distingon.

Esperanto ŝin interesas. Kaj ŝi prezentas la solan Zamenhofidon okupiĝantan aktive pri la

lingvo internacia. Sur la varsovia grundo ŝi estas agema membrino de „Konkordo“. En la internacia movado ŝi ankaŭ laboras. En Vieno dum la XVI-a ŝi vigle partoprenadis multajn fakkunsidojn. Dum plen-kunsido ŝi eĉ publike parolis, alvokante al la reformuloj (io-anoj), ke ili sub preteksto de „evoluo“ ne enkonduku „anarĥion“ en nian lingvon. Plej agema ŝi estis en la studentaj Esperanto-movadoj, kaj en Vieno ŝi prenis je si la taskon de provizora sekretariino de l' Internacia Studenta Esperanto-Asocio. Krom tio, ŝi estas ankaŭ fervora agemulino sur la literatura kampo, kaj el sub ŝia plumo eliris jam multaj tradukoj de polaj aŭtoroj. Interalie ŝi tradukis kelkajn novelojn de Sienkiewicz (eld. Hirt & Sohn). Notinde estas, ke ŝi jam havis tradukaĵojn en jaro 1917, sed ne eldonadis ilin, trovante, ke oni ne devas superŝuti la esperantan merkaton per iaj ajn libroj.

Jes, la dektrijara knabino povus servi kiel ekzemplo al multaj pli aĝaj skribemuloj.

Post la reveno el Vieno ŝia fervoro por Esperanto kreskis ankoraŭ multe pli, kaj ni esperas havi de ŝi unu el plej fervoraj pioniroj de l' esperanta afero sur pola tero.

La plej juna, sed plej esperiga.

VII.

Felikso Zamenhof.

Felikso estas la dua filo (la kvina infano) de Marko Zamenhof.

Li naskiĝis en jaro 1868 en Bielostoko. Kiel kvinjara knabo li transveturas Varsovion en 1873 kun siaj gepatroj kaj ekde tiam restas ĉi tie ĝis nun. Jam en sia frua juneco li evidentigas grandajn kapablojn. Dekjara knabo li eniris en la II-an Varsovian Registar-Gimnazion (la saman, kiun finis Ludoviko kaj aliaj fratoj). Poste li studas dum kelkaj jaroj en apoteko, post kio li estas akceptita en la Varsovian Universitaton, kiun li en 1893 finas kun titolo de farmaciestro. De nun li ree laboras en apoteko kaj fordonas sin plene al tiu profesio, ĉe kiu li restas ĝis nun.

En jaro 1900 li edziĝas kun fraŭlino Heleno Rittenberg. Samjare li akiras apotekon en Varsovio ĉe la placo de Żelazna Brama, kiu ĝis nun ekzistas sur la sama loko.

En sia juna aĝo Felikso amis la viglan vivon, ofte aranĝadis diversajn amuz-vesperojn. Bona deklamisto, li sentis ĉiam inklinon tiudirektan. Li ankaŭ verkadis proprajn originalajn poeziaĵetojn. Precipe li ŝatis la specialajn amuzojn kun infanoj, kaj ĝis nun ankoraŭ tio estas lia plej agrabla distriĝo.

Donacita per reĝisora talento, li ofte aranĝadis komedietojn kaj aliajn deklam-vesperojn. Tiucele li ofte verkadis proprajn komedietojn.

Esperanton li ekkonis tre frue kaj tre rapide ĝin eklernis. Du semajnojn post la ekscio pri ĝia ekzisto li jam verkadis. En la unuaj numeroj de „La Esperantisto“ (Nürnberg) aperis lia unua verko s. t.: „Vizito de la steloj sur la Tero“. Depost tiu tempo ni vidas lin jam fervora esperantisto. Li multe helpas al sia frato Ludoviko en la ekspedo de l' unuaj broŝuroj, poste mem okupiĝas pri la movado (ĝis nun li sufiĉe ageme partoprenas en en la varsovia „Konkordo“) kaj fine multe verkis sur la literatura kampo, kio ĉe li daŭras ĝis nun. Krom siaj multaj malpligrandaj poeziaĵoj kaj versaĵoj Felikso Zamenhof (uzanta ĉiam la pseŭdonimon Fez) verkis: „Homa doloro“ (poemeto), „Aro da poeziaĵoj“ (inter kiuj estas rimarkinda la „interna voko“, kiu puŝadis lin, — voko, kiun multe ŝatis kaj estimis nia Majstro) k. a.

Nun s-o Felikso Zamenhof estas feliĉa „pater familias“, havas tri tre inteligentajn infanojn, okupiĝas iom pri filantropio, kaj precipe laboras en sia metio.

VIII

D-o Leono Zamenhof.

D-o Leono Zamenhof okupas unu el plej evidentaj lokoj en la esperantista movado ne nur kiel frato de l' Majstro, sed pro siaj propraj meritoj sur la esperanta agokampo. Kaj mi ne trograndigos, se mi permesos al mi aserti, ke ne ekzistas en la tuta mondo iu aktiva esperantisto, kiu ne konus tiun nomon.

Pri la junaj jaroj de Leono mi scias ne multe. Li edukiĝis kompreneble en la samaj cirkonstancoi kiel Ludoviko kaj aliaj fratoj.

En 1875 li naskiĝis en Varsovio. La komencajn instruojn li ricevis hejme, poste en lernejo. En 1885 li eniras la II-an varsovian registar-gimnazion, kiun li en 1893 finas.

En 1900 li finas la varsovian universitaton kaj dediĉis sin al kuracado de l' orelo, gorĝo, nazo kaj malsanoj de l' parolo (balbutado). Ĝis 1905 li praktikas en hospitaloj kaj malsanulejoj. Dum la rusa-japana milito li estis kiel kuracisto mobilizita kaj pasigis pli ol jaron en Mandĵurio. En 1906 li revenas Varsovion, instaliĝas ĉe strato Żelazna 75 kaj komencas sian regulan praktikon.

En 1909 D-o Leono Zamenhof edziĝis kun fraŭlino Leokadio (filin' de Sigizmundo kaj Salomeo) Warszawska. Post jaro la familion feliĉigis per sia naskiĝo la filino Wanda, kaj en 1915 la familio pligrandiĝis per ankoraŭ unu filino Irena.

Nuntempe D-o Leono Zamenhof estas jam tre ŝatata kuracisto kaj fama sur varsovia grundo pro sia aktiva partopreno en la socia vivo.

Ekde siaj junaj jaroj Leono sentis grandan amon al literaturo, precipe al tiu, traktanta la sonciajn demandojn. Sur tiu kampo li ankaŭ poste mem verkadis, skribadis diversajn artikolojn kaj broŝurojn. Speciale li studis pri tio kaj verkadis multe pri la kolonizo kaj sendependa vivo de hebreoj en Blankrutenio kaj Sudrusujo (demando, kiu interesigis multe ankaŭ nian Majstron). Kompreneble tiutempe tio estis nur projektoj. Tamen nun ili komencas jam iomete realiĝi.

Multe ankaŭ skribis D-o Leono Zamenhof pri demandoj soci-etikaj (Pri egaleco kaj justeco), pri etiko en medicino, pri reformoj en la hospitaloj ktp.

En la jaroj 1918—1919 li aranĝadis multajn prelegojn en Varsovio (pri la hebrea demando).

Krom ĉiuj-ĉi laboroj li dediĉas multe da tempo kaj energio al profesiaj laboroj. Ĝis nun en diversaj germanaj kaj polaj jurnaloj aperis liaj sciencaj ellaboraĵoj profesiaj.

Sed apud ĉio supre menciita li ne forgesas pri Esperanto. Vigle partoprenante ĉiam en la lokaj societaj movadoj, li multe ankaŭ laboras sur la skriba kampo Dum kelkaj jaroj li redaktis „Polan Esperantiston“, kiu tiun tempon devas alkalkuli al siaj plej brilaj periodoj. Samtempe li kunlaboradis en multaj aliaj eksterlandaj gazetoj esperantistaj. Aparte eliris: Mia Liro, Aspazio (de Svjentoĥovski), Protesilas kaj Laodamia (de Wyspiański). El la Konstituciaj Tagoj (da Rejmont) kaj Somo Sierra.

Ni aldonu ankoraŭ, ke D-o Leono Zamenhof estas Lingva Komitatano kaj Akademia Korespondanto kaj vigle agas en tiu ĉi fako.

Tre ofte li uzadis la pseŭdonimon de Lozo aŭ LoZo (ankaŭ Elzet).

La lastajn jarojn lia literatura agado malplifortiĝis iomete. Tamen ni lin vidas konstanta kunlaboranto de Literatura Mondo kaj protektanto de Heroldo de Esperanto (antaŭe Esperanto Triumfonta).

Pli ofte jam aperadis (en la lastaj jaroj) liaj alvokoj. El tiuj ni devas ĉefe citi tiun en Esperanto Triumfonta n-o 14 s. t. „La korpo kaj animo de Esperanto“, konsekvence de kiu naskiĝis la movado „Konkordo“, kies celo estas unuigi la adeptojn de l' Interna Ideo en la tuta mondo. Li do estas la spirita patro de tiu ideo. Kaj se ni, bazante nin sur la kongresparolado de nia Majstro dum la II-a Kongreso en Ĝenevo, akceptos ke tiu interna ideo estis ĝuste tiu kerno, tiu animo de Esperanto, kiun nia Majstro pleje ŝatis (kaj kiu eble estis instigilo por krei la lingvon), ni devas kun pura konscio kaj plena buŝo ekkrii: **Inda frato de nia Majstro.**

IX.

La ceteraj membroj de l' familio Zamenhof ne prezentas jam iajn specialajn meritintojn por la esperanta movado. Ni do kontentiĝu per mallongaj priskriboj.

D-o Henriko Zamenhof

naskiĝis en 1871 en Bjelostoko. Lia juneco pasas pli malpli simile al tiu de la aliaj fratoj. Iomete nur ĉe la fino de gimnazio lia vojo diferenciĝas. Li post fino de 6 klasoj sukcesis ekzamenon je instruista atesto kaj nur post du jaroj sukcesis kiel „eksternisto" (ne lernejano) la ekzamenon de plena gimnazio (8 klasoj). Post la fino de l' universitato (ĉirkaŭ 1895) li plene fordonas sin al sia kuracarto (malsanoj de l' haŭto kaj kosmetiko), kion li faras ĝis nun. Dum la rusa-japana milito li ankaŭ estis mobilizita.

Li edziĝis kun f-lino Sabina Szpinak, kun kiu li havas du filojn.

Esperanton li scias, sed tute pri ĝi ne okupiĝas.

La plej purkoran noblulon, la plej imageblan delikatecon, la enpersoniĝon de subtileco se oni volus vidi — sufiĉus, ekkoni lin. Kvieta, tamen agema. Komplezema kaj bonkora ĝis plej alta grado. Naturo treege sentema je ĉio bela, li multe dediĉis sin al la estetiko. Dum multaj jaroj li redaktis(-as) la ĵurnalon „Kobieta" (Sinjorino) speciale dediĉitan

al la gardo de l' beleco kaj kosmetikismo. Ankaŭ la talento lin ne evitis kaj siatempe li skribadis poeziaĵojn. Se li estas devigita elekti inter sia propa feliĉo kaj la bono de iu alia, li senhezite decidiĝas por la bona de l' aliulo. Nobla koro Zamenhofa!

X.

D-o Aleksandro Zamenhof,

la plej juna el la fratoj, naskiĝis en 1877 en Varsovio. Biografio simila aĵ ĉiuj aliaj. Nur spirite li estis pleje ligita kun Ludoviko. Kaj ilia intimeco estis plej forta. Samspecaj estis iliaj aspiroj kaj ofte tial ili planadis kune. Siatempe ili kune studadis la demandoń pri ia kolonio por la hebreoj en Ameriko, precipe por pusi hebreojn al agrikultura laboro. Tio estis idealisto-revulo, kaj eble tie kuŝis la kaŭzo, kial Ludoviko lin plej forte amis kaj sentis sin plej ligita kun tiu frato. Laŭ karaktero li estis la modelo de boneco, kvankam iomete flamiĝema, kaj tio povis lin ŝajnigi malbona. Komplezema, kompatema li estis, senlime sentema je ies malfeliĉo aŭ sufero. Iomete ankaŭ karakterizis lin firmemo kaj obstinemo (ecoj iom komunaj kun Ludoviko). Dum la eŭropa milito li estis mobilizita kiel kuracisto kaj restis en la rusa armeo. En 1916 la varsoviaj gazetoj komunikis pri lia morto en Dinaburg. Nia Majstro je tiuj famoj ne kredis kaj supozis, ke tio estas eraro. Tamen, post kelkaj monatoj ricevinte leteron de sia filino Sofio (kiu ankaŭ kiel kuracistino restis en Rusujo), en kiu ŝi priskribis la morton, li konvinkiĝis, ke tio estis vera. La efiko estis terura. Io kvazaŭ en lia koro deŝiriĝis. Li ekmalsanis kaj . . . plu ne leviĝis.

La familianoj klopodas nun venigi lian korpon Varsovion: la familio Zamenhof eĉ post la morto ne disiĝas.

XI.

La fratinoj de la Majstro.

El la fratinoj de nia Majstro, unu (Saro) mortis kiel juna knabineto, la ceteraj tri: Fani, Aŭgusta kaj Ida vivas ĝis nun. Pri Esperanto neniu el ili okupiĝas.

Fani

edziniĝis kaj ricevis la nomon Pikover. Nun ŝi havas tri infanojn, kiuj scias kaj iom okupiĝas pri Esperanto.

Aŭgusta

edziniĝis kun estiminda s-o Henriko Hermelin, havas kvin infanojn, el kiuj nur unu (f-lino Emilio) okupiĝas pri Esperanto (helpsekretariino de „Konkordo“ en Varsovio).

Ida

edziniĝis kun s-o Zimmermann kaj antaŭ nelonge vidviniĝis. Infanoj ne estas.

* * *

Jen estas la tuta galerio de l' Zamenhofaj portretoj. Mirinda fadeno ja ligas la tutan familion. Ankaŭ ĉiuj envenantoj post nelonga tempo fariĝas neforŝireblaj membroj de tiu familia tuto.

28 membrojn entenas nun tiu tuto. Tuto mirinde forte kunligita kaj neniamaniere disfalebla. Tuto ingigita per la plej fortaj ringoj: Harmonio, Estimo kaj Amo.

Havis nia Majstro, kie inspiriĝi je revo pri „unu granda rondo familia“.

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 231
FILIA Nr 14
w Białymstoku

Galerio
de
Zamenhofoj.

★

Familia bildo kaj portretoj
farĝitaj laŭ
originalaj fotografaĵoj.

Gesinjoroj Zamenhof kun gefiloj Adamo kaj Lili (1916).



Marko Zamenhof

patro de la aŭtoro de Esperanto

1837—1907

Rozalio Zamenhof

nask. Sofer

patrino de la aŭtoro de Esperanto

1839–1892



D-o Lazaro Ludoviko Zamenhof

aŭtoro de Esperanto

1859—1917

Klara Zamenhof

nask. Silbernik

edzino de la aŭtoro de Esperanto

1863–1924

S-ino Fani Pikover

nask. Zamenhof

fratino de la aŭtoro de Esperanto

** 1862*

S-ino Augusta Hermelin

fratino de la aŭtoro de Esperanto

** 1864*



Henriko Hermelin
edzo de Aŭgusta
bofrato de la aŭtoro de Esperanto

Felikso Zamenhof

frato de la aŭtoro de Esperanto

** 1868*

Heleno Zamenhof

nask. Rittenberg

edzino de Felikso

bofratino de la aŭtoro de Esperanto



D-ro Henriko Zamenhof
frato de la aŭtoro de Esperanto
** 1871*



D-ro Leono Zamenhof
frato de la aŭtoro de Esperanto
** 1875*

Leokadio Zamenhof
nask. Warszawska
edzino de Leono
bofratino de la aŭtoro de Esperanto

D-ro Aleksandro Zamenhof
frato de la aŭtoro de Esperanto
1877–1916

Vidvino Ida Zimmermann

nask. Zamenhof

fratino de la aŭtoro de Esperanto

** 1879*

D-ro Adamo Zamenhof
filo de la aŭtoro de Esperanto
** 1888*

D-ro Wanda Zamenhof
nask. Frenkel
edzino de Adamo
bofilino de la aŭtoro de Esperanto
** 1893*

D-ro Sofio Zamenhof
filino de la aŭtoro de Esperanto
** 1889*

Lili Zamenhof

filino de la aŭtoro de Esperanto

** 1904*

La genealogia arbo de l'familio Zamenhof.



Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0000231